## Kaj ankoraŭ io por fini:

*La subaj dudek frazoj sumigas la rakonton. Ili tamen aperas en malĝu[...] ordo. Ordigu ilin:*

1. La ŝipestro telefonis al la pontestro kaj demandis pri la levponto.
2. Okazis granda eksplodo kaj subŝipestro flugis tra la aero.
3. La koko flugis al la stacidomo, vidis lokomotivon, timis kaj frapis sonorilon, kiu falis kaj frapis la telefonon.
4. La ŝipestro pridemandis kandidaton, ĉar li volis trovi novan obs[...] viston.
5. La edzo decidis mallevi la ponton por protekti la trajnon.
6. La vekhorloĝo staris apud la dormanta profesoro kaj ĝi sonoris.
7. La profesoro vekiĝis kaj decidis aĉeti la vekhorloĝon!
8. La trajno kaj la ŝipo venis samtempe al la levponto.
9. La kato falis de la branĉo kaj frapis la kokon, kiu timis kaj f[...] flugis.
10. Vendisto venis al la pordo kaj provis vendi vekhorloĝon.
11. La observisto vidis nenion, do li lumigis alumeton.
12. La trajno foriris tro frue de la stacidomo, ĉar la sonorilo sonis.
13. La vendisto donis la vekhorloĝon al la profesoro, por ke li pr[...] ĝin.
14. La masto frapis la ponton kaj la observisto falis en la cilindron.
15. La trajno preterpasis la domon, sed ĝi ne vekis la profesoron.
16. Tri raketoj falis al la dormo-ĉambro kaj eksplodis laŭte apud dormanta profesoro.
17. La vekhorloĝo vekis kokon, kiu vekis hundon, kiu vekis katon.
18. La raketoj flugis for de la ŝipo, super la urbo.
19. La lasta cilindro venis al la ŝipo kaj la ŝipo foriris de la haveno.
20. La profesoro ne volis aĉeti la vekhorloĝon.

*Vidu paĝon 173; vi povas transformi vian respondon en konkursaĵo[...]*



## Kaj ankoraŭ ankoraŭ io por fini: Ekzerco prepozicia:

Sube vi trovos kelkajn frazojn pri la rakonto, en kiuj vortoj – ĉefe prepozicioj – mankas. Skribu la mankantajn vortojn en la ĝusta ordo kaj iliaj komenc-literoj formos duon-kaŝfrazon, kiun vi sendu al ni por partopreni en loterio, en kiu eblas gajni libro-premiojn. Detaloj troviĝas sur paĝo 173. Elektu el la jenaj prepozicioj: al, antaŭ, apud, ĉe, ekster, el, en, ĝis, inter, kun, laŭ, ol, per, por, pro, sub, sur, super, tra, trans. La komenco de la kaŝfrazo estas:

*Lev kaj Marga ordigas sian domon kaj ...*

1. "Ĉi tiu horloĝo estas .......... vi. Ĝi estas pli laŭta .......... kanono.
2. La raketoj flugas .......... la urbo.
3. La trajno iris sekure .......... la ponto; ĝi restis .......... danĝero.
4. Ili devas trovi la telefonon .......... ĝi ĉesos sonori; ili kuras .......... la paperoj.
5. La stacidomestro kuris .......... la telefono, kiu troviĝis .......... la sonorilo. Li provis voki la pontestron .......... ĝi.
6. La profesoro dormis .......... dormoĉambro .......... la nova vekhorloĝo.
7. La subŝipestro flugas .......... la aero; .......... kelkaj sekundoj li staris [illegible] la ferdeko.
8. La profesoro havis opinion .......... vekhorloĝoj. .......... li, ili estas tro malbelaj.
9. La trajno pasas .......... la domo; baldaŭ estos danĝera situacio [illegible] la levponto.
10. Ru Zofert prenis nomkarton .......... sia poŝo.

Uzu la suprajn prepoziciojn en aliaj frazoj pri vi mem, por montri, ke vi bone komprenas ilian signifon. Ĉu vi kapablas elpensi frazon kun kvar prepozicioj en ĝi? Ĉu kun kvin? Pri ses ni eĉ ne imagu!